ANTAŬEN
suplemento de Informilo
2/26 Oktobro 2018

Enhavo: Ludwig Moser, La gorilo Kolko

Antaŭ 185 jaroj naskiĝis Ludwig Moser, majstro de la "reĝa vitro"

Havi almenaŭ unu produkton de vitrofarejo Moser en la urbo Karlovy Vary estas jam de la 19-a jarcento alte prestiĝa afero kaj simbolo de riĉeco. La fondinto de la firmao, vitrogravuristo kaj poste produktisto de unuaklasa vitro kaj kristalo Ludwig Moser naskiĝis la 18-an de junio 1833.
Lia laboremo kaj entreprenista agado vekas estimon ĝis hodiaŭ. Antaŭuloj de Ludwig Moser devenis el Hroznětín apud Ostrov (super la rivero Ohře) kaj ili sukcesis, danke al persista funkciado de hebrea restoracio en Karlovy Vary; kiel la unuaj izraelidoj ili akiris permeson por daŭra restado en la urbo.

Ludwig devis pro financaj kaŭzoj rezigni pri studado kaj lernis la metion de vitrogravuristo. Poste li longe provis sukcesi en la vivo, ĝis li fariĝis standa vendisto. Dum du jaroj li vendis gravuritajn memoraĵojn al banlokgastoj, kio alportis al li tiom da mono, ke li povis en la urbo malfermi pli grandan metiejon kaj stabilan vendejon. Li vendadis ĉian vitron de speguloj tra pa-

perpremiloj kaj lustroj ĝis glasoj kaj per tio li pli riĉiĝadis. Certatempe li specialiĝis pri luksa facetita kristalo kaj gravurita dekoracia vitro. En la jaro 1873 ekbrilis lia firmao en tutmonda ekspozicio en Vieno, pro kio imperiestro Francisko Jozefo la 1-a honoris lin per la titolo imperiestra reĝa kortega liveranto.

Tiun ĉi enirbileton en la unuan negocan ĉampionludon Moser plene utiligis. Li fondis filiojn en Novjorko, Londono, Sankt-Peterburgo kaj Parizo kaj mendoj amase ruliĝis. En la jaro 1892 li konstruis propran vitrofarejon en antaŭurbo de Karlovy Vary „Dvory“, dungis tie la plej bonajn vitroartistojn kaj en la direktorado de la firmao funkciigis siajn filojn.

La rezulto estis grandioza. Post la sukceso en la monda ekspozicio en Parizo en la jaro 1900 kolektoj de vitro Moser kun flormotivoj allogis nobelaron kaj kortegojn. El la „mosero“ fariĝis "la reĝa vitro".
En la jaro 1901 nomumis Moseron kortega liveranto la persa ŝaho Mussaffereddin, poste la angla reĝo Edward la 7-a kaj sekve moseraj glasoj aperis ankaŭ en reĝaj kasteloj en Norvegio, Bulgario kaj Hispanio.

Kio estis la kaŭzo de la Mosera triumfo? Ĉefe akvaforte orumita dekoro t.n. oroplastikaĵo. Novaĵo estis ankaŭ produktado de kolorigita vitro kaj kristalo ekskluzive sen almiksaĵo de plumbo. Tia kristalo eminentis per brilo, scintileco kaj aparte per dureco, kiu ebligis detalan tajladon.

La unua mondmilito kaj granda malkresko de intereso pri luksaj varoj kaŭzis al Ludwig Moser fine de la vivo grandajn zorgojn.

Post lia morto en la jaro 1916 la firmaon heredis multaj gefiloj kaj genepoj, sed la oraj tempoj estis jam por ĉiam for. Krom tio en la bohemia limregiono fortiĝis germana nacionalismo kaj kontraŭsemitismo. Pro tio Moseranoj vendis en la jaro 1934 siajn dividaĵojn en la firmao kaj per tio finiĝis "mosereca periodo" en vitrofarado. Tamen ĝis nun restas la glora nomo sur la ŝildo de karlovara vitrofabriko (K.Vary), sed jam de aliaj posedantoj.

El gazeto tradukis Josef Hron

Gorilo „Kolko“

Ĝi scipovis proksimume 1000 signojn de gestolingvo kaj komprenis ĝis 2 000 vortoj de la parolata angla lingvo. Ĝi havis inter 75 – 95 punktojn de la intelekto-kvocientoj.(I.Q.) La meznombra I.Q. de la homo estas 85 ĝis 115, do ĝi estas komparebla kun tiu ĉi gorilo. Sed ĝi forpasis antaŭnelonge en Woodside en Kalifornio en la 46-a vivojaro.

Ĝi naskiĝis en ZOO en San Francisco kaj tie ĝi renkontiĝis kun studentino de altlernejo, Francine Patterson, kiu poste fondis la Fondaĵon Gorila kaj fariĝis tutviva kuratorino kaj instruantino de la gorilo Kolko. Ŝi instruis al ĝi gestolingvon kaj komprenon de la parolata lingvo. Ŝi parolis kun ĝi pri la plej komplikaj emocioj, ankaŭ pri la morto. La signifon de la morto ĝi komprenis perfekte. Foje dum la promeno ĝi montris al morta birdo kuŝanta sur la tero kaj kiam la studentino Francine demandis ĝin, kien la bestoj foriras post la morto, ĝi montris: komforta kavo.

Sed la renkontiĝo de la gorilo Kolko kun la morto estis eĉ pli turmenta. Kiam pereis ĝia multjara kunulo Michael, ĝi enfermiĝis kaj preskaŭ pli ol duonon de la jaro ĝi ne komunikis. Nur la artisto Robbi Williams helpis al ĝi el la depresio. Ili tuj amikiĝis. Ili kune kuŝis sur la herbo, li ofte tiklis ĝin kaj ĝi tre ridis. Robbi parolis pri la amikeco kun la gorilo Kolko kiel pri unu el la plej belaj aferoj en sia vivo, kiun li spertis renkonti lin.

Kiam Robbi mortis kaj Kolko informiĝis pri tio, ĝi estis tre trista. Ĝi klinis sin, tremiĝis ĝiaj lipoj, geste aludis la vorton „plori“. Same emocie ĝi korligiĝis al siaj katoj. Senĉese ĝi sopiris esti patrino, sed dum jaroj ĝi ne sukcesis. En la jaro 1983 ĝi deziris ricevi por Kristnasko katidon. Kiam ĝi ricevis donace plusan katon – kun tia ludilo ĝi neniam ludis.

Okaze de sia naskiĝdatreveno poste ĝi ricevis vivan katidon. Ĝi almemorigis globon kaj Kolko nomis ĝin „All ball“ kiel plenan pilkon kaj Kolko zorgis kortuŝe pri ĝi. La forpason de la kato ĝi montris grave: nubmieni – plori, nubiĝi – tristo kaj ĉe tio ĝi ĉiam korŝirante plorsingultis. Ŝiaj proksimuloj devis prizorgi por ĝi plurajn katidojn.

Estas interese, kiel la besto povas esprimi triston pri la forpaso de alia ŝatata besto, siajn empation, lingvon kaj amikecon; estas videble, ke tio ne estas privilegio nur de homoj.

Judita Bednářová el la gazeto Květy,
trad.Eva Pazourková kun J. Rýznarová.

Ni pardonpetas pro alia nomo de la gorilo. Ni aldonis nur unu literon. Ĝuste la gorilo nomiĝis KOKO, sed en Esperanto estas koko hejma galino, hejma besteto. La redakcio